



Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago,

№ 1, Januaro 2007

Feliĉan Novan 2007 jaron!

Karaj societanoj!



Permesu al mi fari konkludojn pri la estrara laboro kaj funkciado dum la pasinta 2006 jaro. Kiel estis planite, la kunsidoj okazis ĉiumonate krom la Decembro.

La reala kvanto de niaj membroj restis sur la sama nivelo. Afable d-ro Chong disponigis al ni lokon por la libraro kaj por arkivejo. Nun oni devas iom ordigi la dokumentaron de la lastaj kelkaj jaroj (temas pri protokoloj kaj korespondado).

Grava agadkampo – informado, nia bulteno SALUTON! aperis regule kaj vi havis eblecon legi 12 numerojn (pri la kvalito juĝu mem). Ankaŭ estis preparita anglalingva informflugfolio pri historio de E-o en la mondo, Usono,

Ŝikago. Baldaŭ ĝi estos multobligita kaj ni devos distribui ĝin tra la publikaj kaj kolegiaj (universitataj) bibliotekoj.

Nia ret-paĝaro estis renovigita kaj ĝisdatigata. Enkadre de kampanio pri subteno de E-redakcio de Pola Radio estis senditaj leterojn al la polaj ambasadejo kaj konsulejo. Estas preparata letero al la urbestro de Ŝikago kaj ni bezonas iun por verki inform-artikolon pri E-o por lokaj gazetoj. En financa sfero ni pretas aboni 1-2 E-revuojn kaj devas nuligi niajn 4-jaran ŝuldon al UEA (pro informo en Jarlibro). Membroj estas petataj pagi kotizon por 2007. Kiel ebla

mon-gajno povas esti reklamo en la bulteno kaj eldonado. En la sekvanta, 2007 jaro, ni devas finfine okupiĝi pri edukado de e-istoj en Ŝikago (volontuloj instrui bv reeĥi).

Estis daŭrigita kontaktlaboro kun la E-kolektivoj el niaj ĝemelurboj. Pri ni oni skribis en Gotenburgo, ni havas anguleton en retejo de Varsovia klubo, urbestro de Milano(!) saluting nin okaze de la Nova jaro. Kronis nian agadjaron sukcesa Zamenhofa bankedo en la persa Reza-restoracio (vd la suban foton).

Kolektiĝis 29 gesamideanoj el kvar apudaj ŝtatoj: Iliinojo, Indiano, Miŝigano kaj Viskonsino, ankaŭ ĉeestis bankedon A-komitatano de UEA E. Kovtonjuk. Okazis bunta kultura programo: post oficiala elpaŝo de la prezidanto sonis flutkaj gitar-muziko, kantoj, originalaj poemoj E-tradukoj el la persa kaj la pola literaturoj, salutoj, ŝercoj, anekdotoj. La ĉeestintoj ĝuis interesan konversacion, fervoran fratecon, varman amikecon, bongustan manĝaĵon.



E-aŭtoro premiita de la Sveda Akademio

La Sveda Akademio, kiu decidas ankaŭ pri la literatura Nobel-premio, la 20-an de decembro diskonigis, ke ĝi premias la konatan esperantiston Ebbe Vilborg per speciala premio de 50.000 svedaj kronoj (iom pli ol 5.000 eŭroj). En la motivo de la premio estas aparte menciita lia laboro por Esperanto, sed ankaŭ liaj verkoj kun rilato al latino kaj la klasika greka lingvo. Ebbe Vilborg, kiu ĉi-jare solenis sian 80-an naskiĝtagon, dum multaj jaroj estis docento pri la klasika greka lingvo en la universitato de

Gotenburgo – partner-urbo de Ŝikago. Li estas honora membro de UEA. Jam en 1958 aperis lia malgranda dudirekta vortaro esperanta-sveda-esperanta, kaj en 1992 estis eldonita lia vortaro sveda-esperanta, la plej granda ĝis nun aperinta leksikono inter la sveda kaj Esperanto. La gazetara komuniko de la Sveda Akademio aparte mencias, ke Ebbe Vilborg pli frue estis ano de la Akademio de Esperanto.

La kunsidon ĉeestis interalie la gereĝoj de Svedio. Dum ĝi la direktoro de la Sveda Akademio, Sture Allén, faris paroladon en kiu li akcentis la neceson defendi la svedan lingvon kontraŭ la angla. Konstanta sekretario de la Sveda Akademio, Horace Engdahl, parolante pri la uzo de la angla lingvo en universitata edukado, diris: Estas bizare, ke iu povas opinii, ke transiro al lingvo, kiun instruistoj kaj studentoj ne plene regas, povus konduki al kvalitaltiĝo en la scienca diskuto. Kiel svedo en la angla oni iĝas pli stulta, kaj la unua konsekvenco ŝajnas esti, ke oni tion ne rimarkas.

Sekvas

– La plej grava E-evento de la ĉi jaro – Universala Kongreso de Esperanto – okazos la 4-11an de Aŭgusto 2007 en la japana havenurbo Jokohamo. Nun aliĝis pr. 900 gesamideanoj el 47 landoj.

– 55-a Kongreso de ELNA okazos en Tiĥuano, Meksikio, 27-30an de Julio 2007. Petu pli da informojn de Mar Kárdenas: Garymar2000@aol.com aŭ de ELNA;

Materialon sendu al: araneoesp @ yahoo.co.uk

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607

Kunvenoj:

Okazas la kvaran mardon de ĉiu monato en: Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.



Sekvantaj kunsidoj:

30an de Januaro – pri sia volontula laboro en la Promesita Lando informos s-ano **Grigorij Dolgin**.

28an de Februaro – d-ro **Lešek Kordylewski** prelegos pri Rajtigita mortigado.

27an de Marto – printempa Nova jaro. Pri iranaj (persaj) kutimoj kaj tradicioj informos **Sepideh Laal**.

Atenton: la programo povos esti ŝanĝata. La prelegontoj estas invitataj



Estrararanoj aktivas

Jen vi vidas la foton de estraranoj de nia societo. Ekde maldekstre s-ro Roberto Stalzer, eksprezidanto, s-ro Yevhen Kovtonyuk, la invitita gasto en la Zamenhofa Bankedo, eksprezidanto de Ukrainia Esperanto-Asocio, s-ro Karlo Gunn, Kasisto, s-ro Puramo Chong, vicprezidanto kaj redaktoro de revuo, s-ro Viktoro Pajuk, nuna prezidanto de societo.